



同語

Mikrofone

7-a jaro • Julio-Septembro, 2009





Redaktora mesaĝo

Estimataj legantoj! Nia kaj ankaŭ via kuriero "Mikrofone" fondita en 2003, ĉiam ricevas fortan subtenon kaj ĝuas vastan ŝaton de legantoj post sia apero.

"Mikrofone" estas jam fenestro, tra kiu viaj vortoj el letero kaj retmesaĝo karesas la okulojn de tutmondaj samideanoj.

Nun la distribua kvanto superas milon kaj centojn da ekzempleroj. En 2007 la kuriero fariĝis gazeto trimonata kaj, en la estonteco eble dumonata dank' al abundiĝo de viaj kontribuajfoj. Ni atendas vian pluan subtenon en la komuna redaktado!

Ja bonvenaj estas ĉiuj kontribuajfoj rilataj al nia disaŭdigo kaj la E-Movado. Ni kune deziru pli prosperan estontecon de nia Mikrofone!

ENHAVO

3 Serioza perforta evento en Xinjiang

5 Sekvu Lina al 65-a IJK kaj 94-a UK

- ★ Noktomeza renkontiĝo kun Petro Chrdle en flughaveno
- ★ Ekskurso en Prago per historia tramo
- ★ Okultrafa E-familio, amindaj infanoj
- ★ Vizito al Josef Kavka, redaktoro de "Geologio Internacia"
- ★ Gastado en la hejmo de 87-jaraĝa Eli Urbanova
- ★ Sindonemaj volontuloj en E-Muzeo en Svitavy, Ĉeĥio
- ★ Ĉarma Prago, helpema Jiri Patera
- ★ Monde konata "Astronomia Horloĝo" en la centro de Prago
- ★ 100-jara E-klubo en Prago
- ★ "La Koro de Pollando" metata en heroo Varsovio
- ★ Komforta promeno en Chopin-Ĝardeno
- ★ Vigla Movada Foiro de 94-a UK
- ★ Brila inaŭguro de 94-a UK
- ★ Leopold Patek, Harada Hideki kaj aliaj en Radio-Aŭskultantoj
- ★ Amindaj lernantoj de Esperanto-Lernejo en Benino
- ★ Belartaj Konkursoj kaj centjara jubileo de Internaciaj Floraj Ludoj
- ★ Ulrich Lins: talenta esploristo pri E-movado
- ★ La Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko

12 Intervjuo

Omaĝe al Prof. D-ro Ivo Lapenna, meritplena akcelanto de Esperanto

14 Tra la Mondo

15 Mikronovelo

Homo kaj Simio en zoo

Ĉi-jare 45-jariĝos la E-elsendo de Ĉina Radio Internacia. Celebre al la 45-jariĝo, ni okazigos artikolpeton kun la temo: "Mi kaj la 45-jara E-elsendo". Ni esperas, ke vi daŭre nin subtenos kaj kunlaboros kun ni kaj verkos ion impresivan, kortuŝan kaj neforgeseblan koncerne al la elsendo aŭ ion pri kontaktado kun nia Redakcio en la pasintaj pli ol 40 jaroj. Tio sendube estos ege utila por plibonigi nian estontan laboron. Eminentaj kontribuajfoj sinsekve aperos en nia Mikrofone. Ni atendas vian fervoran partoprenon!

Anticipan dankon!

Serioza perforta evento en Xinjiang



Vespere de la 5-a de julio en Urumĉio, la ĉefurbo de Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, okazis perforta krimo de batado, frakasado, rabado kaj bruligado. Ĉinaj specialistoj rimarkigis, ke signoj atestas, ke la evento estas planita kaj organizita de Monda Ujgura Kongreso estrata de Rebiya Kadeer kaj havas intenan politikan celon.

En la evento pli ol 1 000 homoj mortis aŭ vundiĝis, pli ol 200 aŭtoj detruigis kaj 2 domoj brule difektiĝis. Li Wei, direktoro de la sekcio de sekureco kaj strategio sub la Ĉina Instituto de Modernaj Internaciaj Rilatoj, opinias, ke la evento okazis en Ĉinio, tamen ĝi kompakte rilatas al Monda Ujgura Kongreso, fremdlande troviĝanta kaj estrata de Rebiya Kadeer. Li diris: "La evento kompakte rilatas al Monda Ujgura Kongreso, ĉar ni rimarkis, ke estrate de Rebiya Kadeer, Monda Ujgura Kongreso delonge serĉas la ŝancon okazigi perfortan eventon en Ĉinio kaj malhelpi stabilecon kaj disvolviĝon de Xinjiang por akiri pli grandan spacon de sia ekzistado ekster Ĉinio. Ni vidis, ke ĝi senĉese komplotas kaj faras agitadon per interreto aŭ senditoj okaze de la

50-a datreveno de Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, dum la Pekinaj Olimpikoj kaj ĉi-jare antaŭ la 60-jara jubileo de la Ĉina Popola Respubliko. La ordinara batalo inter laboristoj, okazinta la 26-an de junio en la urbo Shaoguan, estas prenita kiel preteksto por la planita kaj organizita evento kun evidenta politika celo."

La 26-an de junio en iu ludilofabrika de la urbo Shaoguan okazis konflikto inter xinjiang-aj kaj alilokaj laboristoj, kaj kelkcent laboristoj partoprenis en la batalo. 120 homoj vundiĝis kaj 2 xinjiang-aj laboristoj mortis en la batalo. Tio estas nur ordinara kazo, tamen gvidate de Rebiya Kadeer, Monda Ujgura Kongreso sensaciis la eventon, malice atakis la partion kaj registaron de Ĉinio kaj ĉiel faris agitadon.

Specialistoj diris, ke la perforta evento, planita de Monda Ujgura Kongreso, ne estas ordinara tumultado, sed same kiel multaj internaciaj separatismaj organizoj ĝi intencis atingi politikan celon per la tumulto. Li Wei diris: "Longperioda celo de Monda Ujgura Kongreso estas fondi la tiel nomatan sendependan ŝtaton. Ni scias, ke ili tre malfacile povas atingi la celon per kreado de

kelkaj homoj fremdlande, tial ili prenas secesion kiel la rimedon por sia vivteno. Ili flatas fremdlandajn kontraŭĉiniajn fortojn per okazigo de eventoj en Ĉinio por akiri iliajn subtenojn."

Post la terorista atako de la 11-a de septembro en Usono iuj xinjiang-aj secesiaj organizoj kuniĝis kiel Monda Ujgura Kongreso por eviti la batalon de la internacia socio kontraŭ terorismaj organizoj. Fakte tiu ĉi organizo intencas ŝanĝi la standardon per "demokratio" kaj "homaj rajtoj" kaj forigi la terorisman nuancon por trompi la internacian socion. La perforta evento en Urumĉio malkovris vualon de la tiel nomataj "demokratio" kaj "homaj rajtoj".

La evento en Urumĉio alportis grandan perdon. Specialistoj emfazis, ke la evento povas nek ŝanĝi ĝeneralan situacion de la stabila disvolviĝo de Xinjiang nek ŝanceli la harmonion kaj stabilecon de la ĉina nacio. La organizo tre malfacile povas atingi sian celon, se la internacia socio rekonas ĝian veran fizionomion. Li Wei diris: "La evento ne povas ŝanĝi ĝeneralan situacion de la stabila disvolviĝo de Xinjiang. Monda Ujgura Kongreso

faris la eventon nur por ricevi pli da subtenoj aŭ pli grandan spacon de sia ekzistado. Se ni klare konigas al la mondo veron de la evento, la organizo neniel atingos la celon."

Pri tiu ĉi evento amaskomunikiloj de iuj landoj, precipe en eŭropaj, distordis la veron, ignorante la vivrajton de viktimoj, kaj tio kaŭzis miskomprenon de tieslandaj popoloj. Ĝuste kiel nia amiko, Narendra Raj Bhattarai, vic-prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio skribis:

"Mi konas ĈRI per Mikrofone kaj gratulas al ĈRI-anaro pro la valora laboro! Via laboro ne nur indas en Esperanto-Movado, sed ankaŭ por konigi Ĉinion al la tuta mondo.

"Konversacianta kun samideanoj de diversaj landoj, mi havas la impreson, ke geamikoj, precipe el Eŭropo kaj Usono, prenas malveran informon pri Ĉinio, precipe pri Tibeta Aŭtonoma Regiono. Mi opinias, ke via revuo devas forigi miskomprenojn tiajn forte.

"Due, mi opinias, ke mankas kontaktoj inter niaj du najbarlandoj. Ni havas bonajn rilatojn de la anktiva epoko, tamen dialogo malmultas inter ni - dulandaj e-istoj. Mi kredas, ke ĈRI povas ludi gravan rolon en niaj duflankaj interŝanĝo kaj kunlaboro. Mi pretas agi miaflanke."

Prave skribis la vic-prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio. Laŭ nia scio, la malvera raportado de la amaskomunikiloj de iuj landoj kaŭzis miskomprenon en la Okcidento ne nur pri Tibeto kaj Taiwan, sed ankaŭ pri Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Tial ni pensas, ke estas necese konigi la veron de la krima evento en Xinjiang.

Vespere de la 5-a de julio, en Urumĉio, ĉefurbo de Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, okazis serioza krima evento de batado, frakasado, rabado kaj bruligado. La furioza evento estas serioza treto al leĝo kaj

alportis grandegan perdon al la vivo kaj posedaĵoj de diversnaciecaj popoloj en Xinjiang. Laŭ statistiko, la evento kaŭzis morton de preskaŭ 200 senkulpaj popoloj, vundiĝon de pli ol mil personoj kaj sume pli ol 260 aŭtoj estas bruligite detruitaj. Ĉinio estas la socialisma leĝ-administra ŝtato, kiu absolute ne toleras similan krimagon, sed klopodas protekti la socian stabilecon kaj solidarecon de diversnaciecanoj. Kompreneble tia kruelaĵo devas esti forte kondamnata. La publik-sekureca instanco de Xinjiang jam laŭleĝe arestis pli ol 1 400 suspektatojn de ĉi-foja perforta krimado.

Laŭ enketado, lastatempe la separatisma organizo "Monda Ujgura Kongreso" estrata de separatistino Rebiya Kadeer, agitis tumulton per interreto kaj aliaj kanaloj. Faktoj pruvis, ke la furioza perforta krimado estas agitata, planita kaj komandita de tri eksteraj fortoj kaj praktikita de enlanda forto.

Sekve en la 7-a de julio, ĉinaj ambasadorejo en Nederlando kaj konsulejo en Munkeno de Germanio suferis atakon kaj iliaj laboroj ne povis normale iri. La ĉina flanko jam prezentis seriozan interkonsiliĝon al Nederlando kaj Germanio. Ĉinio postulas la internacian socion klare koni la esencon de la orientturkestanta terorista secesia forto kaj ne doni al ĝi simpatian, subtenon kaj agitadon en ia ajn formo.



Sekvu Lina al 65-a IJK kaj 94-a UK

Antaŭ ĉio bonvole permesu al mi fari memkonigon. Mi estas Lina, redaktoro de sabata programero "Esperanto en Marŝo" de Ĉina Radio Internacia. En la jaro 2009 mi estis tiel bonŝanca, ke mi partoprenis ne nur en la 65-a IJK sed ankaŭ en la 94-a UK, du gravaj kongresoj en Esperantujo. Ĉi tie mi preferas rakonti mian sperton en la du kongresoj per tagnotado. Nun bonvole sekvu min!

21-an de julio marde serena

Komence de mia hodiaŭa tagnoto, mi volas antaŭ ĉio esprimi mian elkoran dankon al s-ro Petro Chrdle, vicprezidanto de Ĉeĥa E-Asocio. Dank' al li, glate iras nia restado en Prago, ĉefurbo de la bela lando Ĉeĥio.

Preskaŭ noktomeze de la 20-a de julio, Petro Chrdle atendis nin en la praga flughaveno kaj poste per sia aŭto veturigis nin al nia hotelo Krystal, kiu, anticipe mendita de li anstataŭ ni, situas inter la flughaveno kaj la urbocentro. Sincere dirite, tio multe kortuŝas min. Sen li, mi ne povas imagi kiamaniere ni atingu la hotelon, ĉar mi vidis neniun taksion antaŭ la elirejo de la flughaveno. Simpatia kaj helpema Petro Chrdle!



Dum babilado, Petro Chrdle kun intereso sciigis al mi, ke mi estis lia ĉiĉeronino en la 89-a UK okazinta en Pekino en la jaro 2004. Li diris: "En la jaro 2004 vi estis mia ĉiĉeronino, kaj



morgaŭ mi estos via ĉiĉerono."

Matene de la sekva tago, Petro Chrdle laŭplane venis al nia hotelo kaj kondukis nin al historia tramo, per kiu ni poste turismis tra Prago kune kun ekskursanoj de la 65-a Internacia Junulara Kongreso okazanta en ĉeĥa urbeto Liberec' ĉe la landlimo kun Germanio kaj Pollando. Menciindas, ke tie en la haltejo de la historia tramo ni renkontiĝis kun nia fidela aŭskultanto s-ro Jiri Patera, kiu sindoneme servis al ni en la postaj tagoj, kompreneble mi rakontos tion poste.



Nun mi turnu vian atenton al la tuttaga ekskurso tra Prago. En la historia tramo ni nekredeble renkontiĝis kun ĉina esperantistino Nan Matthias-Wang. Edziniĝinte al germana esperantisto en la jaro 2002, ŝi nuntempe havas 2 ege amindajn gefilojn – 7-jaraĝan filinon kaj 4-jaraĝan filon. Mi nun pli kredas, ke naskitoj de diverslandanoj estas relative pli belaj kaj ĉarmaj ol tiuj de samlandanoj. Kompreneble oportune de diversnacieco de la gepatroj, la 2 infanoj denaske parolas ĉinlingve, germanlingve kaj esperantlingve. Kaj mi eĉ kun intereso ĉinlingve babilis kun la du infanoj kaj ili bone respondis per la sama lingvo. Interesas min, ke la pliaĝa fratio sin fadene ligas kun la frato por ke li ĉiam kunestu kun ŝi en la amaso de ekskursanoj. Saĝa knabino! Evidente videblas dum la ekskurso, ke ili estas feliĉaj familianoj. Enviinda familio! Tiutempe mi interkonsentite



planas fari intervjuon al la tuta familio, sed bedaŭrinde mi tion faros nur en la futuro por tempolimigo. Eble en baldaŭa estonteco niaj karaj aŭskultantoj aŭskultos voĉon de la 2 amindaj infanoj.



Karaj, nun bonvole permesu al mi turni vian atenton refoje al la tuttaga ekskurso. Ĉeĥa prezidentejo Martinicky Palaco estas elstara vizitindejo de la ekskurso. Ĉi tie mi pardonpetas, ke mi nur konkludas, ke la palaco estas vizitinda kaj vizitinda, ĉar miaj vortoj estas palaj por priskribi la belan lokon. Por mi okultrafaj estas tiuj ĉarmaj pordogardistoj de la palaco. Hahah, ĉiuj homoj ŝatas ĉarmulojn, ĉu ne?!

Ĉe la fino de ekskurso, malrapideco de ekskursanoj iomete ĝenis nian karan ĉiĉeronon Petro Chrdle. Tamen ne maltrankviliĝu, li, lerta ĉiĉerono, certe havas kontraŭrimedon taŭgan. Kio estas la taŭga kontraŭrimedo? Petro Chrdle rakontis al siaj kondukatoj: Kiam Lina ĉiĉeronis nin en la 89-a UK okazinta en Pekino en 2004, ŝi ade diris "Rapide! Rapide! Alie ni malfruigos!". Kaj nun ankaŭ mi diras la samon: "Rapide! Rapide!" Aŭskultinte la rakonton, ĉiuj ekskursanoj ridetis kaj kompreneble rapidigis siajn paŝojn.

Subite venis al mia kapo sperto pri interŝanĝo de valutoj. Nin eliginte el la palaco, ni intencis havigi al ni ĉeĥajn kronojn, kiuj estas pli favore uzablaj ol eŭroj en Ĉeĥio. Ni tuj trovis, ke kurzo estas tute malsama en diversaj mon-



ŝanĝejoj, kiuj estas ĉie videblaj en la centro de Prago. Interese! En mia patrujo Ĉinio kurzo estas ĉie sama, ĉu en flughaveno ĉu en hotelo. Kaj demando estiĝis en mia kapo. Eble ankaŭ Pollando, nia venonta celloko, estas la sama rilate al mon-ŝanĝo?

Post la ekskurso, Petro Chrdle kondukis nin al la hejmo de ĉeĥa bone konata esperantisto s-ro Josef Kavka, iama redaktoro de la gazeto "Geologio Internacia". Lia hejmo fakte proksimas al nia hotelo. La belega ĝardeno de Josef Kavka profunde allogas min. Vidu, kiel bela kaj kvieta estas la ĝardeno! Ene multaj plantoj nekonataj de mi belege ornamas la ĝardenon. Mi imagas al mi, kia ĝuo estas legado en la ĝardeno. Josef Kavka, mastro de la belega ĝardeno, ĝoje babilis kun ni kaj eĉ gastame regalis nin per dolĉaĵoj. Intertempe mi eĉ longtempe babilis kun la filino de Josef Kavka en la telefono. La denaska esperantistino rakontis al mi, ke la patro parolis al ŝi esperantlingve, kiam ŝi venis al la mondo. Poste mi hazarde trovis, ke en Ĉeĥio estas nemalmulte da denaskaj esperantistoj. Mi eble aldonos koncernan rakonton en la futuro.

Tempas por mia nokta dormo!

22-an de julio merkrede serena

Ĉi-matene nia kara aŭskultanto s-ro Jiri Patera kondukis nin al la hejmo de ĉeĥa esperantisto-poeto s-ino Eli Urbanova. Ŝi debutis kiel poetino en la jaro 1940 per la ĉeĥlingva poemo "Spegulo". Scipovinte nian lingvon Esperanto en la jaro 1948, ŝi esperantlingve ekverkis poemojn kaj akiris elstarajn atingojn. Krome, ŝi gajnis



eĉ premion Osiek pro la vaste laŭdata romano "Hetajro Dancas". Fakte leginte amasajn laŭdojn pri la romano, mi havas impulson legi la romanon. Bedaŭrinde, 87-jaraĝa Eli Urbanova ne multe rakontis pri la pasinteco pro ne tre bona memoro.

Tempo rapide pasis. Posttagmeze alia simpatia esperantisto s-ro Jirka Tomeček aŭte veturigis nin al bela urbeto Svitavy. Dum la 3-hora veturado, mi multe ĝuis la belecon ambaŭflanke de la ŝoseo. Mi diris al mi en la koro, ke Ĉeĥio estas perfekta loko por geedziĝa fotado kaj la popolana vivo ĉi tie kredeble estas kvieta, komforta kaj harmonia kun la naturo.

Akompanate de lokaj gastamaj esperantistoj, ni vizitis urban muzeon de Svitavy. Montrinte antikvan maŝinon, la direktorino de la muzeo Blanka Ĉuhelova demandis, ĉu ni scias, kio estas la maŝino. Kompreneble mi neniam ĝuste divenis funkcion de la maŝino sen sciigo de aliaj. Ĝi estas lavmaŝino uzita en la 30-aj jaroj de la 20-a jarcento. Mi nomas ĝin praulo de la modernaj lavmaŝinoj. En tuta etaĝo estas dekoj da tiutempaj diversformaj lavmaŝinoj, kiuj manifestas la evoluadon de la historio pri lavado. Tiuj lavmaŝinoj estas nekredeble malsamaj ol la modernaj laŭ la ekstera aspekto. Kompreneble tekniko de la homaro estas magia kaj ĉio estas ebla. En la urba muzeo estas ankaŭ ekspozicio pri Oscar Schindler, kiu naskiĝis ĝuste en tiu ĉi urbeto Svitavy kaj savis multajn judojn en la 2-a mondmilito. La ekspozicio iasence montras al mi kiel terura estas milito kaj kiel kruelaj estas tiuj kontraŭhumanismaj militlanĉintoj. Pacon al la tuta homaro!

Nuntempe mi volas koncentri la

atenton al ŝtata nivela E-muzeo en Svitavy. La E-muzeo, kies fondiĝo gajnis fortan subtenon de la loka registaro, staras apud la urba muzeo. Surprizas min, ke ene estas tiel multe da trezoraj materialoj rilate al Esperanto. Ekster mia atendo, tie sin trovas ankaŭ ĉinaj infanlegaĵoj. Ni promesis kontribui aliajn ĉinajn infanlegaĵojn al la muzeo, demandite de tieaj sindonemaj volontuloj pri ebleco de nova kontribuado. Menciindas, ke kvankam la edzo de Libuse Dvorakova, volontulo en la muzeo, estas neesperantisto, tamen li tute subtenas Esperanton kaj servas en la muzeo kiel fotisto. Iasence, li estas alispeca volontulo en la muzeo. Tiuj sindonemaj volontuloj tiel delikate laboras, ke ĉio en la muzeo estas en bona ordo. Pliajn sukcesojn al vi, sindonemaj volontuloj!

Ŝajnas, ke mi estas laca. Do mi finu la skribadon!

23-an de julio ĵaŭde serena

Tempo rapide pasas! Frumatene de la sekva tago ni iros al la praga flughaveno, kie ni poste flugos al Varsovio por la 94-a UK. Kaj nia fidela aŭskultanto s-ro Jiri Patera kondukis nin al la centro de Prago kaj sindoneme servis kiel nia ĉiĉerono. Sincere dirite, s-ro Jiri Patera estas simpatia kaj helpema. Vidu, li akompanis nin ĉie en sinsevkaj 3 tagoj kaj ĉiam pretis esti je nia dispozo, konsiderante nian alilandanecon. Ĉi tie bonvole permesu al mi esprimi mian elkoran dankon. Koran dankon, Jiri Patera!

Pravas la onidiro, ke Prago estas belega urbo en Eŭropo. Konstruata stilo en Prago profunde impresas min pro tio, ke la stilo estas tute diferenca ol tiu en



Pekino, ĉefurbo de mia patrujo Ĉinio. Miaopinie, Pekino havas relative pli modernajn kaj altajn konstruaĵojn, dum Prago bone konservas siajn malnovajn konstruaĵojn, kies eŭropeco estas tute freŝa por mi aziano, kiu unuafoje vizitis Eŭropon.

Konklude dirite, “Astronomia Horloĝo” el vizitindejoj en Prago pleje impresas min. Ĉirkaŭe staras pacience amaso da turistoj el la tuta mondo, celante nur aŭdi laŭhoran sonoradon de la horloĝo kaj propraokule spekti statuojn de 12 sanktaj adeptoj de Jesuo Kristo. La 12 sanktaj adeptoj duope aperas en la malfermitaj fenestroj kiam laŭhore sonoras la horloĝo. La tute speciala vizitindejo ne mirige allogas ĉiujn vizitantojn en Prago. Se mi ĝuste memoras, mi fakte spektis “Astronomian Horloĝon” en televido antaŭ kelkaj jaroj. Ekster mia atendo, ke mi hazarde spektis tion dufoje en Prago.

Ankaŭ menciinda estas Venceslao rajdstatuo de Josef Václav Myslbek sur Venceslao Placo en la centro de Prago. Laŭ konigo de s-ro Jiri Patera, Venceslao, princo en la 10-a jarcento, fariĝis nacia sanktulo de Bohemio kaj Ĉeĥio pro tio, ke li, kvankam subigita al tiutempa germana imperio, alportis pacon al la popolo, kiun eniugis longtempa milito.

Nun mi volas doni kelkajn vortojn al E-klubo, kiun ni vizitis posttagmeze, dank’ al delikata plano de Jiri Patera. Tie ni nin renkontiĝis kun Marta Šmidrkalova, kiu estas la plej aĝa membro en la klubo. Nekredeble, ŝi, 88-jaraĝa, ankoraŭ aspektas vigla. Ŝi sufiĉe flue kaj klare babilis kun ni dum longa tempo. Multege min surprizas, ke la klubo fondiĝis antaŭ pli ol 100 jaroj kaj ĝiaj klubanoj regule kunvenas ĉiusemajne post la fondiĝo. Tie ni kun intereso legis libron kun elektitaj trezoraj historiaj fotoj kaj materialoj pri Esperanto. Evidente videblas el tiuj fotoj kaj materialoj, kiel pene kaj diligente laboras ĉeĥaj esperantistoj! Kiel kutime s-ino Marta Šmidrkalova petis al vizitantoj restigi



siajn nomojn. Do tie legiĝas jenaj nomoj Lina Chen kaj Jianping Zhao.

24-an de julio vendrede serena

Ĉi-matene ni laŭplane flugis de Prago al Varsovio kaj poste trajnis al Bjalistoko, hejmloko de E-kreinto L.L.Zamenhof. Estas bone konate, ke en Bjalistoko okazos la 94-a UK speciale celebre al la 150-jara jubileo de la grandulo.



Epizodo. S-ino Tang Li, pollingva raportistino de Ĉina Radio Internacia en Varsovio, simpatie donis al ni necesan helpon. Ŝi unue invitis nin al tagmanĝo en ĉina restoracio. Dank’ al ŝi, mia “ĉina stomako” bonege ĝuis la tagmanĝon, ĉar mia “ĉina stomako”, bedaŭrinde, ankoraŭ ne povas tute alkitimiĝi al okcidentaj manĝaĵoj. Mi esperas, ke tio ne incitis niajn eŭropajn amikojn.

Poste s-ino Tang Li ankaŭ kondukis nin viziti tra Varsovio. Sendube Varsovio estas heroa urbo. Retrorigardante la tutan historion, la pola popolo multe suferis pro milito, ekzemple la Dua Mondmilito komenciĝis kiam Hitler tondre atakis Pollandon. Estas monde konate, ke nesubiĝemo de la pola popolo kolerigis Hitler tiel, ke li intencis eligi Pollandon el la mapo. En Varsovio estas facile troveblaj lokoj memore al tiuj, kiuj estis masakritaj de Hitler. La urbo Varsovio estis tiel longtempe kaj serioze detruita de Hitler pro sinvenĝo, ke restis en Varsovio nur detruaĵoj post la sendependiĝo post la Dua Mondmilito. Tial, kontraste al Prago, malfacile sin trovas en Varsovio originalaj malnovaj domoj.

Nesubiĝema Pollando estigas multajn patriotojn, inter kiuj Chopin, monde fama muzikisto, estas ekzemplo. En la 19-a jaraĝo, li forlasis la patrujon, kiu tiutempe estis disdividita de Germanio, Aŭstrio kaj Rusio, kaj poste dumvive vivis en Parizo. La koro, laŭ lia volo, estis transportita al Pollando post lia forpaso. Nuntempe “la koro de Pollando” estas metata en Grandkruca Preĝejo.

En la centro de Varsovio situas Chopin-Ĝardeno. Fakte tio ne estas la

originala nomo de la ĝardeno, tamen ĉinoj kutime nomas ĝin Chopin-Ĝardeno pro tio, ke ene de la ĝardeno estas statuo de la patrioto-pianisto Chopin.

Papo Johano Paŭlo II estas alia heroo por Pollando. Mi nomas lin fiero de Pollando. En la centro de Varsovio estis establita granda kruco post la forpaso de Papo Johano Paŭlo II. Tie mi vidis, ke maljunulino prezentas florojn antaŭ la kruco kaj pie faras preĝon. Kredeble, Papo Johano Paŭlo II estas vaste respektata ne nur de liaj samlandanoj sed ankaŭ alilandanoj.

Estas tre malfrue. Mi decidis lasi flanken la tagnoton kaj min ĵeti al la lito.

25-an de julio dimanĉe serena

Mi volas komenci la hodiaŭnan tagnoton per nia piedirado al la kongresejo de nia hotelo Gromada, kiu situas malproksime for de la kongresejo je ĉirkaŭ 10 km. Post ioma tempo, ni jam rimarkis, ke ni bezonas longan tempon por piedirade atingi la kongresejon. Dume patrola aŭto de la loka polico pasis. Sciante, ke ni iros por ĉeesti al la 94-a UK, la 2 policanoj en la patrola aŭto afable veturigis nin al staci-domo, de kie ni povas preni aŭtobuson n. 10 al la kongresejo. Ĝojiga renkontiĝo!

Atinginte la kongresejon, ni vidis, ke la akceptejo estas tute homplena: iuj intime babilas, aliaj atendas por akiri kongresan sakon, triaj viciĝas por mendi hotelojn kaj kvaraj retumas.

Tempo rapide pasas! Vespere sub longa kovrita promenejo antaŭ la kongresejo iuj vikle pretigas faldfoliojn sur la tablo. Aliaj muntis standon. Kelkaj homoj serĉis la plej bonan lokon por





aŝio. Aliaj movis tablojn kaj seĝojn. Kaj tiu aktiveco ne rilatis specifan grupon. Homoj junaj kaj kor-junaj, viroj kaj virinoj, eŭropanoj, afrikanoj, azianoj, amerikanoj... Post duonhoro amaso da homoj promenis en la ĝardena koridoro, plenplena de buntaj tabloj kaj gajaj homoj, kiuj prezentas, babilas, ŝercas, indikas, klarigas... Kial tiom da agado? Temas pri la Movada Foiro, speciala evento kiu ekde la UK en Italujo en la jaro 2006 okazas dum la unua tago de la kongreso.

En la Movada Foiro estis centoj da asocioj grandaj kaj malgrandaj: landaj asocioj, fakaj asocioj, kulturaj centroj, eldonejoj, edukaj instancoj kaj multaj aliaj. Tie ĉe la Movada Foiro sentebles la vasteco kaj varieco de nia movado.

Nome de E-redakcio de Ĉina Radio Internacia, ankaŭ mi kaj mia direktoro viglis en la Movada Foiro. Ni unue prezentis serion da niaj gazetoj "Mikrofone" sur la tablo. Niaj aŭskultantoj kaj legantoj iuj post aliaj venis al nia tablo kaj babilis kun ni pri nia E-elsendo kaj nia trimestra gazeto "Mikrofone". Inter ili, iu esperantisto multe impresis min, ĉar li ĉiutage kvarfoje aŭskultas nian elsendon. Nekredeble, ĉu ne? Por mi, E-redakciano, tre ĝojas informiĝi, ke nia elsendo estas ŝatata de niaj aŭskultantoj.

Krome, niaj legantoj ĉeloke petis niajn gazetojn kunportatajn de ni. Kaj post nelonga tempo ili estis tute disdonitaj al niaj legantoj. Videblas, ke nia E-elsendo posedas amasajn aŭskultantojn kaj nia gazeto "Mikrofone" multajn legantojn. Tie dekoj da esperantistoj, kiuj neniam ricevis nian gazeton, restigis iliajn poŝtadresojn por ke ni sendu al ili niajn gazetojn en la futuro. Enhavoriĉa tago!

26-an de julio dimanĉe pluva

Kelkaj esperantistoj demandis, ĉu la Bjalistoka UK estas mia unua UK. Fakte ne! La unua estas la 89-a UK, okazinta en la jaro 2004 en Pekino, kaj tiutempe mi servis kiel volontulino. Ĉi-foje mi servas unuafoje kiel raportisto, tial ĉi-matene



mi frue alvenis al la kongresejo. Enirinte en la salonon Zamenhof, mi tuj ĉie serĉis Clay, Konstantan Kongresan Sekretarion de UEA, por gajni de li nomliston de inaŭguraj parolantoj. Dank' al Dio, mi sukcesis trovi lin, kiu kompreneble estis tute okupita antaŭ la baldaŭa inaŭguro. Sed li, bedaŭrinde, havis nur unu nomliston, tial mi povas fari nenion ol skribi kopii la nomliston. Post gajno de la nomlisto, mi poste min turnis al akustika teknikisto por konsiligi, kiamaniere mi pli benefike surbendigu la inaŭguron.

Je la 10-a horo laŭ la loka tempo solene inaŭguriĝis en la salono Zamenhof la 94-a Universala Kongreso, kies temo estas "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ". Laŭ la plej nova statistiko, donita de Clay, entute 1840 homoj ĉeestis al la inaŭguro. Li tamen substrekis, ke sinsekve al la kongreso ĉeestos ankaŭ aliaj esperantistoj, kiuj unuj post aliaj alvenos al Bjalistoko dum la kongreso.

Ekster mia atendo, en la inaŭgurejo mi renkontis iujn konatulojn kia s-ro Augusto Casquero, eksprezidanto de Hispana E-Federacio. Estas granda surprizo kaj ĝojo, ke ni kuniĝas ĉi tie. Mi nun turnas mian atenton al la inaŭguro. Ĝi estis prezidata de profesoro Probal



Dasgupta, nuna prezidanto de UEA. Kiel kutime, la kongreson salutas gravuloj, kiaj s-ro Bronislaw Komorowski, la Alta Protektanto de la 94-a UK, s-ro Tadeusz Truskolaski, urbestro de Bjalistoko, kaj d-ro Louis Christophe Zaleski Zamenhof, nepo de L.L.Zamenhof.

Menciindas, ke nome de la Fondaĵo "Pogranicze", Krzysztof Czyzewski, membro de la Honora Patrona Komitato de la 94-a UK, akceptis la "Medalon de Toleremo" de doktoro Louis Zaleski Zamenhof pro ĝiaj elstaraj agadoj, inter ili la plej imitinda agado estas "Limteritorio", kiu temas pri edukado de infanoj estimi aliulojn, kaj lerni malkovradi kaj priskribadi la lokan historion. La medalo ĝis nun ricevis nur la papo Johano Paŭlo la Dua kaj la Monda Organizo de Skolta Movado.

Posttagmeze de la 26-a de julio multaj aktivadoj laŭorde iras. Inter ili, mi ĉeestis ankaŭ al "Omaĝon al Lapenna". Probal Dasgupta, nuna prezidanto de UEA, prezidis la programeron omaĝe al la centa datreveno de la granda antaŭulo. John Wells, eksprezidanto de UEA, parolis pri sia kunlaboro kun Lapenna, pri kiu rememoris ankaŭ d-ro Louis Zaleski Zamenhof kaj Osmo Buller. Ĉeestantoj spektis ankaŭ filmfragmenton pri unu el





la paroladoj de Ivo Lapenna. Konklude dirite, la programero estas enhavoriĉa! Mi planas elsendi la programeron post mia reveno al mia kara patrujo Ĉinio.

Noktomezas! Do mi finu hodiaŭan tagon ĉi tie!

27-an de julio lunde serena

Kiel la antaŭaj tagoj, mi ellitiĝis frumatene, kaj ekster mia atendo, hodiaŭ verŝajne serenas, dank' al Dio.

Informite de mia direktoro s-ro Zhao Jianping pri mia ĉeesto al kunveno de radio-aŭskultantoj, mi kaj ĝojis kaj maltrankviliĝis ĉefe pro tio, ke mi nebone parolas esperantlingve. Mi laboras en nia radio ĉefe kiel tradukistino kaj malofte esperante parolas. "Ne gravas, Lina! Eltiru lecionon ĉi-foje kaj min ekzercu en la futuro." Mi diris tion al mi mem.

Frue atinginte la kunvenejon, mi ĝojis trovi, ke ene estas dekoj da homoj. Do ili certe estas niaj aŭskultantoj. "Pardonu, nia programero ankaraŭ ne finiĝis," venis al miaj oreloj tia atentigo. Mi tuj rimarkis, ke ĉe la podio prelegas esperantisto. "Oh, mi pardonpetas." Mi tuj montris mian pardonpeton. Finfine ĉirkaŭ je la 14-a horo aŭskultantoj de E-radioj, kiaj Ĉina Radio Internacia, Kuba Radio kaj Pola Radio, unuj post aliaj eniris en la kunvenejon. Laŭ mia ne tre preciza kalkulo, proksime 40 homoj ĉeestis al la kunveno.

Kiel kutime, Barbara Pietrzak, nuna estrarano de UEA, reprezentante Polan Radion, kaj lerte kaj sperte prezidis la tutan kunvenon. Kaj ĉiuj radioj rajtas konigi al siaj aŭskultantoj la plej novan progreson respektive en 5 minutoj. Verŝajne, 5 minutoj sufiĉas, ĉu ne? Ĉar la tuta kunveno okupas nur 60 minutojn. Barbara Pietrzak afable donis al mi la unuajn 5 minutojn. Bedaŭrinde mi, spertomanka en tia kunveno, kun streĉo koncize konigis al niaj aŭskultantoj pri la antaŭ-nelonge renovigita retejo <http://esperanto.cri.cn>, pri elŝutebleco de niaj intervjuoj en la retejo, pri nia ĉiama pliboniĝanta gazeto "Mikrofone", pri baldaŭa 45-jariĝo de E-elsendo de Ĉina



Radio Internacia kaj pri nia funkciigo de speciala rubriko koncerne al la 94-a UK. Krome, mi iomete konigis pri nia redakcio, opiniante, ke niaj aŭskultantoj interesiĝas pri niaj redakciaj: nuntempe estas entute 15 homoj en nia oficejo, el kiuj kolegiinoj Mirinda kaj Pluveta forestas pro novnaskitoj. Gratulon, Mirinda kaj Pluveta! Sciinte pri tuta senpageco de la gazeto "Mikrofone" por aŭskultantoj kaj legantoj de Ĉina Radio Internacia, aŭskultantino ŝercis, ke Ĉina Radio Internacia certe estas tiel riĉa, ke ĝi tute senpage disdonas gazetojn. Hahah! Mi ridete diris al ŝi, ke nia radio tre volontas esti je la dispono de niaj aŭskultantoj kaj legantoj.

Post reciproka konigo fare de Ĉina Radio Internacia, Pola Radio, Kuba Radio kaj Radio Vatikana, Pola Radio bonege regis la etoson de la cetera kunveno. La genia babilemeco kaj bonega regemeco de la radio certe iasence konkeris aŭskultantojn.

Kaj min ĝojigis ĉeesto de niaj fidelaj aŭskultantoj kiaj Leopold Patek kaj Harada Hideki. Ĉi tie bonvole permesu al mi akcenti, ke Leopold Patek la unua atentigis nin pri portempa neaŭdebleco de nia ĉiutaga programero en la interreto. La neaŭskultebleco, kaŭzita de portempaj teknikaj kialoj, nun estis solvita. Ĉi tie mi volas esprimi mian elkoran dankon al Leopold Patek. Koran dankon, Leopold Patek!

Ĝojiga informo estas tio, ke post la kunveno, iuj esperantistoj, kiuj kvankam neniam legis nian gazeton en la pasinteco tamen volas havigi al si la gazeton, restigis al mi iliajn adresojn. Kaj nia gazeto kredeble atingos ilin en baldaŭa estonteco.

28-an de julio marde serena

Noktomeze! Aŭskulteblas nenia sono ol tajpado de tagnoto en mia portebla komputilo. Miaj okuloj, kvazaŭ pezaj je 100 kg, multfoje preskaŭ tute sin fermas, tiel ke mi preskaŭ povas fari nenion ol batali kontraŭ dormemo. "Kiel bone, se mi nun povus min ĵeti al la lito kaj ĝui



belan nokton!", mi diris al mi en la koro. "Ne! Ne!" mi tuj neis la ĵus naskitan ideon. Mi preferas fini la tagnoton hodiaŭ ol lasi ĝin ĝis morgaŭ. Do mi komencu la tagnoton!

Frumatene atendante aŭtobuson n. 4 antaŭ nia hotelo Gromada, mi kun intereso rimarkis, ke tage brilas lampoj de ĉiuj aŭtoj irantaj sur la strato. Tre interese! En Ĉinio videblas la fenomeno nur en mallumaj tagoj kaj noktoj. Kial polaj aŭtoj briligas lampojn eĉ tage? Feliĉe mia



demando estis tuj solvita de mia direktoro s-ro Zhao Jianping, kiu plurfoje vojaĝis al Eŭropo. Ĉiuj aŭtoj en Eŭropo aŭtomate briligas lampojn tuj ĉe stirado kaj tio grandproporcie reduktas la nombron de aŭtoakcidentoj. Kompreneble tio samtempe signifas, ke multe reduktiĝas la nombro de malfeliĉuloj trafataj de akcidentoj. "Bonege! La brila ideo estas referencinda por mia patrujo Ĉinio." Mi ne povas min elteni de admiro.

Alia interesa fenomeno temas pri mia nomo Lina. Dum la kongreso pluraj esperantistoj kun miro demandis, ĉu Lina estas mia vera ĉina nomo. Vidu, estas populare, ke alilandanoj ne povas facile eldiri ĉinajn nomojn. Mi ade substrekas,





ke Lina vere estas mia ĉina nomo, dum "Li" signifas "belan" kaj "na" estas knabina nomo. Spite al signifoplena nomo, mi tamen kuraĝas esti nomita bela knabino: Sed dank' al mia patro, li donis al mi nomon facile eldireblan por alilandanoj.

Konklude dirite, hodiaŭ mi estas bonŝanca. Vidu, ĝuste en la tago mi sukcesis fari intervjuon al s-ino Birthe Lapenna, edzino de s-ro Ivo Lapenna, kaj d-ro Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de E-kreinto L.L.Zamenhof. Nun bonvole permesu al mi fari rakonton, se tio ne ĝenos niajn aŭskultantojn kaj legantojn. Tagmeze mi kaj s-ino Birthe Lapenna libere babilis pri s-ro Ivo Lapenna. Estas bone konate, ke en 2009 estas la 100-jara jubileo de s-ro Ivo Lapenna. Kompreneble mi ne lasos tiel gravan jubileon flanken sed planas fari specialan programeron ĝuste memore al la gravulo en la historio de Esperanto. Menciindas, ke s-ino Birthe Lapenna estas absolute bona intervjuito kaj la tuta babilado iris en bona etoso. Rememorante, s-ino Birthe Lapenna diris: "Mia edzo Ivo Lapenna estis tute speciala homo. Li havis ĉiujn plej bonajn kaj belajn ecojn: bela, ĉarma, genia kaj entute unika. Li ja estis ne nur la arkitekto kaj konstruinto de la moderna Esperanto-Movado, sed ankaŭ la plej granda oratoro en la Esperanto-movado."

Poste tute ekster mia atendo, mi hazerde renkontis d-ron Louis Christophe Zaleski-Zamenhof. Mi tuj kaptis la bonegan ŝancon kaj informis lin pri mia baldaŭa programero pri la 150-a jubileo de E-kreinto L.L.Zamenhof. Laŭ mia peto li afable parolis pri la kontribuo kaj grandanimeco de sia avo.

Simple dirite, la tago estas fruktodona. Ĝis morgaŭ!

29-an de julio merkrede serena

Noktomeze!

Hodiaŭ estis ekskursita tago de la 94-a UK okazanta en Bjalistoko, hejmloko de Eesperanto-kreinto L.L.Zamenhof, kaj nature okazis preskaŭ neniuj aktivadoj dum



la tuta tago.

Antaŭ ĉio mi preferas rakonti pri Esperanto-Lernejo en Benino ol pri la tuttaga ekskurso, ĉar mi estas tiel profunde impresita de la lernejo. Nun bonvole sekvu mian rakonton pri la lernejo!



Enirinte en akceptejon hieraŭ, kie samtempe okazis diversaj dispozicioj, miaj piedoj tuj ĉesigis antaŭenigon ĉe ekspozicia budo de Esperanto-Lernejo en Benino, ĉar mia atento estis tute kaptita de la ekspozicio. Ankaŭ s-ino Anna Lowenstein, la edzino de Renato Corsetti, kun granda intereso staris antaŭ la budo, spektante alterne aperantajn fotojn pri ĝojaj kaj amindaj lernantoj. Nun lasu nin iomete konigi al vi pri Esperanto-Lernejo en Benino. La lernejo, iniciatita ĉefe de benina esperantisto s-ro Jean Codjo kaj establita en la jaro 2002, ĝuas sindoneman subvencion de internaciaj organizoj kia "Monda Fondaĵo" kaj ankaŭ de alilandaj esperantistoj. En la fundamenta lernejo nun estas entute 250

Esperanto-lernantoj, kiuj, spite al severa manko de materialoj, ankoraŭ estas gajaj en lernado de Esperanto kaj ankaŭ en la ĉiutaga vivo. Konsiderante interesigon de niaj legantoj, mi surretigis ĉi-rilatajn fotojn en nia retejo <http://esperanto.cri.cn>, el kiuj evidente videblas gajeco de tiuj amindaj infanoj. Menciindas, ke el iamaj lernantoj eliris la nuna prezidanto de Benina Junulara E-Asocio.

Nun mi turnu vian atenton for de Esperanto-Lernejo en Benino kaj al nia promenado tra la centro de Bjalistoko. Hodiaŭ ni preferis promeni ol ĉeesti al la tuttaga ekskurso, konsiderante, ke unuflanke ni havas perfektan akompananton, kiu bonege scias la urbeton Bjalistoko; aliflanke la tuttaga ekskurso estas relative luksa pro ne sufiĉa sumo en niaj manoj. Ekstere serenas! Tute liberaj estas ni! Kial ni ne promenu?! Nun ekiru kune kun mi!

Dank' al Dio, ni estas sufiĉe feliĉaj, ĉar ekster nia atendo aŭtobuso n. 4 antaŭ nia hotelo povas rekte veturigi nin al la dezirata loko Imperiestra Palaco. Oportune de urbeteco de Bjalistoko, ni atingis la cellokon post nelonga tempo kaj sufiĉe ĝuis nian promenadon. Ĉu vi kredas, ke tio estas la unua fojo por ni promenadi en la urbeton? Nekredeble? Ni ĉiutage dediĉas nin al raportado de la 94-a UK, la plej pompa kaj grava kongreso en Esperantujo, tial estas malfacile akirebla ŝanco, ke ni tiel libere promenigas sen konsideri la laboron.

Dume surpriza rimarko ĝojigas min, ke ĉie videblas niaj verdaj flagoj surstrate. Duflanke de la verda flago kuniĝas flagoj pola kaj bjalistoka. Bonege! Mi ne povas min deteni de fotado. Kompreneble tiuj fotoj estas videblaj en nia retejo.

Dormeco refoje atakas min en noktomezo, tial mi devas fini la hodiaŭan



tagnoton kaj lasi aliajn menciindajn rimarkojn nur en mia kapo. Ĝis morgaŭ!

30-an de julio merkrede serena

Multaj aferoj estas interesaj por mi, nova vojaĝanto al Eŭropo. Kompreneble mi ne hontas pri tio, konsiderante mian ankoraŭan junecon:)

Nun bonvole prenu tason da kafo kaj sekvu miajn interesajn rimarkojn.



Jena estas la unua rimarko. Konsiderante malproksimecon, ni fine forlasis ideon pri piedrado al la kongresejo kaj prenis unue aŭtobuson n. 4 de la hotelo al stacidomo kaj poste n. 10 al la kongresejo. Kontraste ol en Pekino, busbiletoj en Bjalistoko estas aĉetebblaj en preskaŭ ĉiaspecaj vendejoj kaj hoteloj. Enbusiĝinte, oni devas enmeti la bileton en maŝinon por ke la maŝino stampu tempon sur la bileto. Surprizas min, ke neniu zorgas, ĉu vi stampigis la bileton. Sed mia opinio poste ŝanĝiĝis. Iutage juna virino enbusiĝis kaj laŭvice postulis al pasaĝeroj elmontri biletojn. En tiu momento, mi komprenis, ke bilet-stampigo ne estas tute senzorgata! Eble tio estas bona rimedo, tiel ke pasaĝeroj memkonscie stampigas biletojn kaj buskompanio ne bezonas dungi multajn konduktorojn.

Alia interesa rimarko temas ankaŭ pri busbiletoj. Rimarkinde, ke mankas al mi busbiletoj, mi tuj min eligis el kongresejo kaj kondukis al antaŭkongreseja vendejo por havigi al mi busbiletojn. Ve! La vendejo aperis antaŭ mi en tuta fermeco kaj kompreneble neaĉetebblas busbiletoj tie. Kion fari? Ĝuste en tiu momento, alia kongresano venis al mia direkto kaj renkontis la saman aferon. Alia malbonŝanculo. Ni poste estis sciigitaj, ke en Bjalistoko vendejoj fermas dum la tuta dimanĉo! Feliĉe, ke poste studentino vendis al ni biletojn sufiĉnombrajn por nia reveno al la hotelo. Falo en fosajon, gajno en saĝo! Ekde tiam, mi ĉiam anticipe pretigas sufiĉan nombron da biletoj.

Nun mi min turnu al hodiaŭaj aktivadoj, el kiuj "Libroj de la Jaro" kaj "Belartaj Konkursoj" allogis min.

En la programo "Libroj de la Jaro" rekomendindaj legaĵoj pri Esperanto aŭ por Esperanto estas laŭvice prezentataj de s-ro Stano Marček, s-ro Petro Chrdle, s-ro Ionel Onet kaj aliaj. Kredeble tiuj rekomenditaj libroj vekos intereson de legemuloj.

Je la 16-a kaj duono okazis en la salono Lapenna premidona ceremonio de Belartaj Konkursoj. Kompreneble ne nur! La ceremonio, prezidata de fama esperantisto Tonkin, omaĝis al forpasinta poeto Sylla Chaves kaj festis la centjaran jubileon de la Internacia Konkurso Floraj Ludoj, kiu okazis unuafoje en la jaro 1909 en Barcelono.

Intertempe gesinjoroj Roessler per muzika kontribuo multe honoris al la programo. Dume lerta flutado venigis al ili fojfojan aplaŭdon!

Ĝis morgaŭ!

31-an de julio vendrede nuba

Konklude dirite, hodiaŭ estas fruktodona por mi.

Matene en la kongresejo s-ro Ulrich Lins subite aperis antaŭ mi kaj diris:



"Vi serĉas min?" "Jes! Jes!" mi ĝoje respondis. Eble niaj legantoj miris pri la kialoj. Mi planas fari specialan raporton pri la 100-jara jubileo de Ivo Lapenna kaj preni Ulrich Lins kiel bonan intervjuaton, ĉar li sufiĉe montras al la publiko sian talenton en esplorado de E-movado en la libro titolita "La Danĝera Lingvo". Interkonsentite, mi planas fari intervjuon al li dum la UK, sed bedaŭrinde mi neniam vidis lin en sinsekvaj tagoj. Sincere dirite, estas tute ekster mia atendo, ke mi renkontiĝis kun li antaŭ mia baldaŭa foriro de Bjalistoko al Varsovio. Kompreneble mi ne lasis la bonan ŝancon flanken kaj elmetis al li kelkajn demandojn pri la 100-jara jubileo de s-ro Ivo Lapenna. Kompreneble la intervjuo glate iris.

Antaŭ nia foriro de la kongresejo al stacidomo, s-ro Jaroslaw Parzyszek, LKK-ano respondeanta pri eksteraj rilatoj, afable proponis veturigi nin al la

stacidomo per sia aŭto kaj survoje viziti kelkajn lokojn koncerne al Esperanto. Bona ideo, ĉu ne? Nun bonvole sekvu nin!

Antaŭ ĉio, ni estis kondukitaj al surmura memorŝtono koncerne al s-ro Jakobo Ŝapiro. La memorŝtono legiĝas jene: En tiu ĉi domo loĝis dum la jaroj 1919-1941 eminenta esperantisto, ĵurnalisto, verkisto kaj instruisto, murdita de nazioj la 12-an de julio, 1941. Do kiu estas s-ro Jakobo Ŝapiro? Laŭ dokumento, li, tre agema, laboris kiel asistanto de vojevodo, instruisto kaj ĵurnalisto, kaj sin dediĉis al la ideo de Esperanto. Li estis konata homo en la antaŭmilita Bjalistoko-aŭtoro de la unua Esperanta turisma gvidlibro en Bjalistoko, prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo Ludoviko Zamenhof kaj kreinto de turisma sekcio de Universala Esperanto-Asocio. Sufiĉe aktiva!

La sekva celloko estas naskiĝdomo de L.L.Zamenhof. Tie memorŝtono legiĝas: Ĉi tie staris la domo, en kiu 15-an de decembro de 1859, naskiĝis kreinto de internacia lingvo Esperanto d-ro Ludoviko Zamenhof. Tie staris la domo, nome la domo ne plu ekzistas. Antaŭ ni estas nur malgranda ebenejo. Bedaŭrinde!

La lasta celloko estas La Centro Ludoviko Zamenhof. Bona novaĵo: dum la Universala Kongreso, eniro en la centron estas tute senpaga. La centro estas 2-etaĝa bela domo. Kaj ĉe enirejo amasiĝas esperantistoj. Enirinte, oni trovos, ke ene estas delikate elektitaj fotoj kaj materialoj pri L.L.Zamenhof, ekzemple pri naskiĝo, enlernejigo, kreiĝo de Esperanto kaj tiel plu. S-ro Jaroslaw Parzyszek pravas: kiel ni povas foriri sen viziti tiujn lokojn.


Karaj legantoj, mi volas atentigi vin, ke tio estas mia lasta tagnoto, ĉar hodiaŭ ni trajnos al Varsovio por frumatene de la sekva tago preni aviadilon de Varsovio al Frankfurto, de kie ni flugos al Pekino. Bedaŭrinde ni ne povas resti ĝis la fino de la UK. Adiaŭ, Bjalistoko! Adiaŭ, la 94-a UK!

Karaj, nun mi finu mian rakonton pri la 65-a IJK kaj la 94-a UK. Se vi volas kontribui al ni vian sperton en la du kongresoj aŭ doni viajn opiniojn pri miaj ĉi-rilataj tagnotoj, bonvole sendu ilin al mi laŭ la retadreso: lina68@tom.com aŭ aassii929@hotmail.com Kaj en nia retejo <http://esperanto.cri.cn/94uk/> legeblas pli multe da interesaj rakontoj pri la du gravaj kongresoj.



Omaĝe al Prof. D-ro Ivo Lapenna, meritplena akcelanto de Esperanto

Okaze de la centjara jubileo de Prof. D-ro Ivo Lapenna (1909.11.5.—1987.12.15.), la plej grava kaj meritplena akcelanto de la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia kulturo post D-ro L. L. Zamenhof dum preskaŭ 60 jaroj, nia gazeto “Mikrofone” faris ĉi-rilatan intervjuon kun s-ro Ulrich Lins, kies talento en esplorado de la Esperanto-movado evidente videblas en la libro titolita *La danĝera lingvo*.



Mikrofone: Konklude dirite, kia homo estas Ivo Lapenna en via impresio?

Ulrich Lins: Ivo Lapenna estis tre impona persono laŭ la ekstera aspekto. Li estis altstatura homo kun bela vizaĝo, tiel ke foje oni lin komparis kun romia imperiestro. Kaj pli gravas, ke li parolis nekredible belan Esperanton. Li estis la plej elokventa kaj karisma oratoro de la Esperanto-movado. Liaj paroloj en la Universalaj Kongresoj kaj aliloke ĉiam estis tre imponaj kaj ĝuindaj. Esperantistoj, kiuj eble antaŭ la kongreso ne estis tre agemaj, estis instigitaj aktivi pli multe dank’ al liaj paroladoj, dank’ al lia talento.

Mikrofone: Kion rimarkindan Ivo Lapenna alportis al la Esperanto-movado post sia eniro en la estraron de UEA en la jaro 1937?

Ulrich Lins: UEA jam ekzistis ekde la jaro 1908. Kiam Ivo Lapenna estraraniĝis en 1937, li transprenis organizaĵon, kiu jam firme establiĝis en

la Esperanto-movado. Sed oni ne povas nei la fakton, ke antaŭ la alveno de Ivo Lapenna la movado ne havis organizan profilon. La esperantistoj estis ĉiam bonvolemaj, sed tion ne akompanis organiza kapablo. Kiel aludas la vorto movado, oni celas iel organizi, sed ĝuste tion neglektis UEA ĝis alveno de Ivo Lapenna. Oni tro multe kondukis kiel familio kaj ĝuis la kunestadon en familia rondo. Tio kompreneble estas bela afero. Sed tute alia afero estas la demando: kiel progresigi Esperanton, kiel rilati al neesperantistaj organizaĵoj, kiel proksimigi Esperanton al tio, kion oni kutime nomas la fina venko. Tiurilate Ivo Lapenna havas grandan meriton. Li admonis la esperantistojn al ia minimuma disciplino. Kompreneble tiu vorto disciplino ne plaĉas al multaj homoj. Sed por progresigi ion, oni bezonas iom da disciplino. Mi donu unu ekzemplon: En la jaro 1947, post la Dua Mondmilito, Ivo Lapenna publikigis artikolon, en kiu li kritikis la esperantistojn pro troa portado de verda stelo. Li admonis la esperantistojn, ke ili ne troe dismontru eksterajn signojn de la interna entuziasmo. Por krei seriozan bildon de la Esperanto-movado antaŭ la cetera mondo li celis forigi ĉiajn signojn de sekteco.

Mikrofone: Ivo Lapenna estas nomata “la plej grava kaj meritplena akcelanto de la Internacia Lingvo Esperanto” kaj “la arkitekto kaj konstruinto de la moderna Esperanto-movado” pro siaj gravaj kontribuoj al la progresigado de Esperanto. Ĉu vi povas doni al ni kompletan bildon pri liaj kontribuoj en la Esperanto-movado?

Ulrich Lins: Mi ne scias, ĉu mi povus klarigi ĉiujn liajn kontribuojn, ĉar li vere faris tre multe. Ne eblas resumi tion en kelkaj frazoj. Dum pli ol 30 jaroj li estis estrarano de UEA: unue simpla estrarano, poste ĝenerala sekretario kaj



1966. La prezidanto de UEA, Prof. d-ro Ivo Lapenna. Oficiala foto de UN okaze de la transdono de la Propono favore al Esperanto al la Sekretariato de UN en New York la 6-an de oktobro 1966.

fine prezidanto de UEA. En tiuj funkcioj li multe progresigis UEA. Li organizis ekzemple la subskribokampanjon ĉe Unuiĝintaj Nacioj komence de la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento, kiu poste interalie rezultigis faman rezolucion de Unesko favore al Esperanto en Montevideo. Tio ĝenerale levis la prestiĝon de UEA ĉe la neesperantistaj organizaĵoj kaj ligis UEA al Unesko per konsultaj rilatoj. Sekve de la unika atingo ĉe Unesko, kiu estis vera mejloŝtono en la historio de la Esperanto-movado, granda nombro de artikoloj estis publikigita en la monda gazetaro. Rezultis multaj aliaj gravaj atingoj, dank’ al la elstara personeco kaj multflankaj talentoj de Ivo Lapenna. Kompreneble oni povas diri, ke tio ne proksimigis nin al la fina venko. Sed la seriozeco de la Esperanto-movado multe kreskis dank’ al la streĉado de Ivo Lapenna. Tamen, oni devas aldoni, ke Ivo Lapenna havis ankaŭ mankojn. Li fariĝis tro memfida, ĉar vere ne estis aliaj homoj, kiuj povis kun li rivali. Li iĝis konvinkita pri sia neanstataŭigebleco. Estis ankaŭ multaj homoj, kiuj opiniis, ke nun junuloj

iĝu gvidantoj. La rezulto estas la fama konflikto en Hamburgo en 1974, kiam Ivo Lapenna sentis sin devigita ekŝiĝi el la prezidanteco kaj Humphrey Tonkin fariĝis lia posteulo. Hodiaŭ tamen oni parolas plejparte favore pri Ivo Lapenna. Oni ĉi-jare festas lian centan naskiĝdatrevenon. Ne plu estas multe da kritiko kontraŭ Ivo Lapenna. Tute male. Kiam oni retrorigardas, pezas pli multe la pozitivaj atingoj de Ivo Lapenna kaj liaj eraroj forgesiĝas. Ĉiuj homoj kompreneble havas erarojn. Ivo Lapenna do plue servas al UEA kiel gvida stelo. Ĝis la lasta spiro li daŭrigis sian laboron por la Internacia Lingvo Esperanto.

Mikrofone: Kiel vi diris, Unesko akceptis rezolucion favore al Esperanto en la jaro 1954 en Montevideo. Konkrete dirite, pri kio ĉefe temas la rezolucio?

Ulrich Lins: La rezolucio temas pri la kontribuo de Esperanto al la interpopola kompreniĝo kaj paco. Pli frue, post la Unua Mondmilito, oni jam klopodis ĉe Ligo de Nacioj por voĉdono pri Esperanto. Ĝi voĉdonis, sed ne faris ion plian krom deklari sian simpatian. Edmond Privat, la tiutempa aganto de UEA, esperis, ke Ligo de Nacioj pledos por la enkonduko de Esperanto en lernejojn. Sed tion oni ne volis. Estis politike tro tikla afero. Nun ni estas kontentaj, ke Unesko ĝenerale subtenas la strebojn de la Esperanto-movado. Kaj en sia laboro, la esperantistoj povas sin apogi je la favora deklaro de Unesko. Se temas pri la enkonduko de Esperanto en la internacian vivon, la angla lingvo, la franca kaj kelkaj aliaj lingvoj estas tiel potencaj, ke Esperanto ankoraŭ ne estas serioze konsiderata. Okaze, UN kaj Unesko plue montras sian simpatian. Mi memoras, ke en 1977 la tiama ĝenerala direktoro de Unesko eĉ venis al la Universala Kongreso de Esperanto en Islando; en 1985 la ĝenerala konferenco de Unesko en Sofio akceptis novan, tre favoran rezolucion pri Esperanto; kaj la ĝenerala direktoro de Unesko preskaŭ



1959. Frostavallen, Svedio. I.a. la ĝenerala sekretario de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna (meze de la unua vico), s-ro Ito el Oomoto, s-ro Pragano, d-ro Marjorie Boulton, Tibor Seklj, s-ro Strønne kaj s-ino Birthe Zacho (poste Lapenna).

ĉiujare sendas mesaĝon al la inaŭguro de la Universala Kongreso. Ni ankaŭ havas niajn agantojn en Parizo, kiuj regule rilatas kun la oficistoj de Unesko. Do, ni povas diri, ke post la fama deklaro de Unesko en Montevideo bone evoluas la rilatoj inter Unesko kaj UEA.

Mikrofone: Estas bone konate, ke Ivo Lapenna gravas en la moderna UEA. Ĉu vi povas ĉi-rilate klarigi al ni liajn kontribuojn en la konstruado de la moderna UEA?

Ulrich Lins: Jes. Li fondis en la jaro 1952 la Centron pri Esploro kaj Dokumentado (CED), kiu ankoraŭ nun ekzistas. Ĝi estas la esplora fako de UEA. Se oni volas informiĝi pri Esperanto, oni bezonas la bazon de fidindaj faktoj. CED daŭre kolektas bazajn faktojn ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri mondaj lingvaj problemoj. Neeviteble la skalo de CED etendiĝis ankaŭ al lingvaj problemoj en la mondo, kiuj ne rekte rilatas al Esperanto. Sub Ivo Lapenna estis fondita la revuo La Monda Lingvo-Problemo, unu el la ĉefaj iniciatoj de CED. Ĝi nun aperas sub la titolo, Lingvaj Problemoj kaj Lingvoplanado, kiu enhavas altnivelajn sciencajn kontribuojn en la angla kaj

aliaj lingvoj pri diversaj aspektoj de lingvaj problemoj.

Mikrofone: Nun ni venas al la lasta demando, kiel vi opinias pri la nuna Esperanto-movado?

Ulrich Lins: Mi kredas, ke la Esperanto-movado estas sufiĉe aktiva. Kompreneble ĉiam oni povas deziri, ke ĝi estu pli aktiva. Ni devas ankoraŭ pli multe streĉi niajn fortojn, por ke la homoj en la mondo komprenu, ke ekzistas monda lingva problemoj. Foje oni entute neas la ekziston de lingvaj problemoj. Sed lingva diskriminacio aŭ, pli pozitive dirite, lingva egaleco estas centra demando, pri kiu esperantistoj atentigis kaj atentigas. Espereble pli granda publiko iom post iom ekkonscios pri tiu demando.



1966. Budapeŝto, Hungario. La historie fama Inaŭguro de la UK.



Tra la Mondo

世界各地

Zamenhof-medalon okaze de Zamenhof-jaro

Laŭ informo de Petro Zilvar, la fama germana artisto Peter Götz Güttler kreis por Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg eksterordinaran bronzan Zamenhof-medalon okaze de la 3-a naskiĝtago de Esperanto-urbo (12.07.2009) kaj Zamenhof-jaro. Supozeble la medalo estas la plej elstara Zamenhof-medalo en la historio de la Esperanto-movado. Sur la frontflanko de la medalo estas portreto de Ludoviko Lazaro Zamenhof - (1859 - 1917) Kreinto de Esperanto 150-a naskiĝtago 15-a de decembro, 2009; sur la dorsflanko estas la Esperanto-urbo Herzberg am Harz. Peter Götz Güttler kreis ankaŭ medalon okaze de la 2-a naskiĝtago de Esperanto-urbo (12.07.2008), sur kies frontflanko estas saluto el Herzberg, 2008.

Inaŭguriĝis Esperanto-Centro Zamenhof en Bjalistoko

Ĉeĥa amiko Jindrich Tomišek informis, ke la 21-an de julio, 2009, la urbestro Tadeusz Truskolaski solene inaŭguris Esperanto-Centron Ludwik Zamenhof, troviĝantan ĉe la strato Warszawska, n-ro 19 en la pola urbo Bjalistoko – la naskiĝurbo de la kreinto de Esperanto.

La solenan inaŭguron, krom multaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto, partoprenis ankaŭ iuj gravuloj de Bjalistoko.

Samtempe kun la malfermo de la Centro oni

inaŭguris la konstantan ekspozicion: “Bjalistoko de juna Zamenhof” kaj aliajn du portempajn ekspoziciojn.

La Centro Zamenhof – estas filio de Bjalistoka Kulturcentro – gvidos la agadon, prezentanta la multkulturan karakteron de la urbo kaj la popularigadon de L. L. Zamenhof.

Invito al la 6-a Azia Kongreso de Esperanto

La 6-a Azia Kongreso de Esperanto okazos en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio, de la 19-a ĝis la 23-a de junio, 2010.

Chimedtseren Enkhee el Mongolio

Honor-doktoriga festo en Germanio:

La ekonomika fakultato de la Universitato Göttingen en Germanio distingis la Nobel-premiitan profesoron Reinhard Selten per honordoktora titolo.

Dum la festa laŭdado profesorino Claudia Keser, kiu iam mem eklernis Esperanton, diris kelkajn frazojn en bonkvalita Esperanto al la tuta aŭskultantaro.

La distingitan sesion partoprenis multaj eminentaj profesoroj el Germanio kaj eksterlando. Dum la festo oni kelkfoje menciis Esperanton, eĉ sian fakan prelegon prof. Selten mem komencis en la Internacia Lingvo.

El Ret-Inf Ret-Info

Mikronovelo

微型小说



Homo kaj Simio en zoo

"Kio ili estas?" demandas viro, almontrante enkaĝajn simiojn.

"Ne scias," respondas lia filo, kiu atenteme rigardas saltadon de la simioj.

"Memoru, infano, ke ili estas simioj, ĉi tie speciale por distri homojn."

"Ĉu?"

"Vi ne kredas? Nu!" La viro elsakigas arakidan guŝon kaj ĵetas ĝin al la dorso de granda simio. Tiu besto rapide sin alturnas kaj, post ioma hezito, kaptas la arakidon per sia buŝo. Poste ĝi levas la antaŭan ungon, elbuŝigas la guŝon, ĝin senŝeligas, remetas en la faŭkon kaj maĉas – tre komike.

"Tre amuze!" La infano ridas.

Ĉio de la simio tre amuzas ankaŭ la viron kaj instigas, ke li ĵetu plu arakidon. Li pafas 2-an guŝon al la sama simio. Ĉio ripetigas.

Flamiĝas elano ĉe la viro. Arakidajn guŝojn li ĵetas kaj ĵetas, senĉese. La granda simio buŝe kaptas ĉiun pecon. Sed ĝi disdonas ilin al flankaj simietoj, anstataŭ

mem formanĝi ĉiom.

Lastan pecon. La viro kaj lia filo bedaŭre foriras.

Sur vojo.

"Kial, paĉjo, vi ĵetis ĉiom da ternuksoj al la dorso de tiu granda simio?"

"Por kapti miajn pafaĵojn, ĝi devas sin alturni kaj alturni, amuzige al ni. Ĉu interese, se mi ĵetus arakidon rekte antaŭ ĝin?"

Paŭzo momenta.

"Simio sin opinias saĝa. Fakte trompiĝema. Nur ludilo. Kiom tragike!"

En zoologia ĝardeno.

"Kio la besto?" demandas granda simio, almontrante alpaŝantajn homojn ekster la simia kaĝo.

"Ne scias," respondas simiido, rigardanta homojn kiuj jen malfermas la buŝon, jen svingas la manojn.

"Memoru, infanoj, ke tiaj bestoj, nomataj homoj, estas ludiloj por nin distri!"

"Kiel do?"

"Tiel do..." Ĝuste en tiu momento iu viro ĵetas arakidon al ĝia dorso. Ĝi lerte sin alturnas kaj post ioma cerbumo, kaptas la alĵetaĵon per la buŝo. Sekve ĝi prenas la guŝon el sia buŝo per la dekstra ungo kaj, ĝin senŝeliginte, ŝovas grajnojn en la buŝeton de iu el la simiidoj. Ĝi senŝeligas alĵetitajn guŝojn alterne per la dekstra ungo kaj la liva, kvazaŭ ĝi ludus ĵongladon en cirko.

Finĵetiĝas tuta sako da arakidoj.

Post foriro de ĉiuj homoj, iu el la simiidoj demandas, "Kial vi kaptadis la arakidon ĉiam per la buŝo?"

Ridas la granda simio. "Ĉu tiu besto—viro alĵetus plu tiom da guŝoj, se mi kaptus la 1-an pecon rekte per la ungo?"

"Panjo, vi estas genia!"

"Tia besto nomata homo sin pretendas inteligenta, saĝa, sagaca kaj sprita. Fakte tiaj bestoj estas de ni ofte trompitaj, tamen ili eĉ ĉi tion ne povas kompreni. Kia tragikeco!"

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: espradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Esperanto service, CRI-36

China Radio International

P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

Tel: +8610 68891940

+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: espradio@cri.com.cn

Retadreso: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉefredaktoro: Zhao Jianping

Redaktoroj: Wang Fang

Zhan Xuede

Xiao Henggang